bulgara esperantisto

MONATA REVOU
OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
Rekom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXII	SOFIA	MAJO KAJ JUNIO, 1941

5-6



Nia samideano

Ĝunĉo St. Ĝunĉev,

docento de geografio ĉe la Ŝtata Universitato kaj tre fervora esperantisto, naskita en Bela, la 9-an de marto 1904 j., mortinta la 2-an de junio 1940 j. en Sofia.

Li restis fidela al Esperanto ĝis la lastaj tagoj de sia vivo.

Popolo de moluskoj, aŭ popolo de herooj

La historia vojkurbiĝo, kiun la homaro trapasas en la nuna kriza momento, estas fatala por la esperantismo. Temas pri l'ekzisto aŭ pereo de nia lingvo, de nia movado, de ni mem.

Tamen la estonto de nia afero dependas de nia libervola kaj sincera decido.

La situacio prezentas al ni nur du eblecojn: aŭ tuj entombigi la tutan ĝisnunan vervon, la homamajn kortremojn, sufoki la tutan noblan entuziasmon kaj, ĉesigante ĉiujn penadojn kaj klopodojn, likvidi la plej valoran spiritan kapitalon enspezitan dum momentoj de alta idealismo; aŭ daŭrigi la lukton kaj fruktigi tiun ĉi kapitalon, rekomencante la laborno kun freneza, histeria dinamismo. Meza vojo ne ekzistas. Ĉiu hezito estas perdo de tempo kaj simptomo de malsana volo. La mondo apartenas al la decidemaj kaj energiaj personoj. La molanimaj ŝanceluloj fariĝas baldaŭ ties sklavoj.

La sorto de l'esperantismo troviĝas en la manoj de ĝiaj adeptoj. La triumfo aŭ la disfalo de nia movado dependas de neniu alia krom ni mem. Ĉiu el ni oferis tiom da klopodoj, tiom da esperoj kaj idealemo antaŭ la altaro de la verda religio. La vervoj de nia plej bela junaĝo estas ligitaj kun tiu ĉi movado.

Nun, je la renkonto de l'unua malfacilaĵo, ĉu ni devas kraĉi al nia honorinda pasinteco kaj piedpremi niajn plej ŝatatajn revojn? Iuj „realistoj" perfide lavas siajn manojn, simile al Pontius Pilatus, kvazaŭ neniam ila koro tremis por la nobla celo; aliaj apostatuloj kiel Petro trifoje malkonfesas la jus servitan idealon kaj trifoje neas ĝin je l'unua kokokrio anoncanta la novan historian epokon. Ĉu la kolizio kun la unua malhelpo nepre devas renversi nian moralan ekvilibron?

Ne!

Ni ne estas tiom „realistaj".

Farante la bilancon de siaj spiritaj fortoj en la nuna decida momento, ĉiu esperantisto devas plenkonscie kaj libervole elekti inter la alternativo: aŭ ĵeti la batalilojn meze de la vojo al la venko, kapitulacii antaŭ la embarasoj (la tiel nomataj „malfavoraj cirkonstancoj"), kaj, perdante la plej noblan vervon de sia vivo, fariĝi sklavo kaj ludilo de la hazardo; aŭ — rezisti obstine, defendi freneze la verdan standardon, kaj, venkante ĉiujn malfacilaĵojn (kiuj plej ofte estas nur subjektivaj, psikologiaj, ĉar ili troviĝas en ni mem) fariĝi estro de la destino.

Ni elektis la duan loton. Ĉar ni scias, ke en ĉiu batalo la finan venkon gajnas tiu, kiu povas pli longe atendi kaj rezisti. Neniu milito daŭras eterne. Sed la ideoj estas eternaj. Esperanto konkeros la mondon, kiel la kristanismo konkeris la Roman imperion. La triumfo de nia kaŭzo ne estas malproksima. Por tio ĉi tamen estas necesa pli da kuraĝo, unueco kaj abnegacio. La esperantista popolo estu nek amaso da moluskoj, nek svarmaĵo de rampvermoj — ĝi estu popolo de herooj. La herooj estas dorlotataj infanoj de la sorto.

D-ro St. Ĝuĝev

Ni ne ĉesigu nian laboron!

Decide ni turnu supren la rigardojn, kaj ni vidu ke ankoraŭ la lumo brilas, nur ni mem ne turnu for la okulojn. La vojo al lumo estas laciga, sed feliĉiga. Enlasu la lumon en koron kaj spiriton kaj lasu vin inspiri al agado por la lumo, por Esperanto, por pli bona stato de l'mondo.

Certe estas bona la proverbo: „Ni fosu nian sulkon". Sed pro tio oni tamen ne devas ĉiam kaj ĉiam fosi nur unu saman kaj solan sulkon. Nur sulkon post sulko la kampo estas plugota; same la esperanristoj devas okupi ĉiam novajn terenojn kaj sin adapti al la cirkonstancoj por fine atingi la celon.

La intereso pri la lingvoj vivas ĉe la publiko; same ekzistas ankaŭ intereso pri sociaj aŭ internaciaj aferoj, kia ja ankaŭ estas la Esperanto-movado kaj ĝiaj ideoj.

Necesas nur, ke vivu la entuziasmo ĉe ĝiaj adeptoj mem.

Esperanto de U. E. A.

AKTUALAĴOJ

La unuiĝo de la bulgara popolo

La bulgara popolo travivas tagojn de plena ĝojo kai tutpopola feliĉo. — Macedonujo, Apud-Egea Trakio kaj Moravio jam denove estas partoj de la bulgara teritorio. Ok monatojn post la revenigo de Suda Dobruĝa, ankaŭ la tri ceteraj karaj filinoj troviĝas sub la familia tegmento de la patrujo. La bulgara popolo estas unuigita! — Fine realiĝis la granda revo de la bulgaroj kaj restariĝs unu historia justeco!

Okupante la centran parton de la Balkana duoninsulo, la bulgaroj estis el la unuaj popoloj de Eŭropo, kiuj fondis sian propran, sendependan kaj bone organizitan ŝtaton. Dum la jarcentoj ili prezentis multajn kaj evidentajn pruvojn de kulturkapabla kaj progresema laboro, doninte al multaj popoloj alfabeton, literaturon kaj kulturon.

Tamen, malgraŭ la sendubaj kaj grandaj meritoj antaŭ la kulturhistorio de la homaro, kaj pli speciale de la Balkano, la bulgara popolo estis devigita entrepreni grandajn kaj epikajn batalojn por sia sendependo kaj unueco. La invadoj de imperialismaj fremdaj popoloj, aŭ de enviaj najbaroj, ofte kaŭzadis pezajn suferojn subjuginte ĉu la tutan, ĉu partojn de la bulgara teritorio. Tamen, nek la jugo, nek la suferoj sukcesis mortigi la bulgaran spiriton — kontraŭe, la suferoj fortigis kaj firmigis ĝin. Nun malgraŭ ĉio, la bulgara popolo estas la plej multenombra sur la Balkano, la plej kulturkapabla kaj pogresema.

Lastamonate, kiam la venkaj trupoj de la renovigita Germanujo persekutante siajn celojn, liberigis la ĝisnun subjugitojn bulgarojn kaj donis al ili eblon libere deklari antaŭ la mondo, ke ili estas bulgaroj, ke ili kun ĝojo aliĝas al la patrino Bulgarujo, la tuta bulgara popolo solene festis sian unuiĝon.

La grandaj manifestadoj de sincera ĝojo, kiuj okazas en la limoj inter la blua Danubo kaj la Egea maro, kaj de la Nigra Maro ĝis la urbo-sanktejo Ohrid, estas vera montrilo, ke tie loĝas unu bulgara popolo unugita per la granda ideo: loĝi en sia propra, sendependa kaj forta bulgara ŝtato kaj denove daŭre esti portanto de kulturo kaj progreso inter la aliaj progresemaj popoloj en la mondo!

Stefan Ganĉev

PANTEONO DE LA PIONIROJ

Gunĉo Gunĉev

Depost kiam ekzistas la mondo, saĝuloj kaj filozofoj okupis sin per la demandoj pri vivo kaj morto. Demandoj profundaj, nesolveblaj, enigmaj kaj samtempe neatingeblaj por la homo kaj por la homa cerbo. Kio estas la vivo, kion prezentas la morto? Kie finiĝas la unua por komenciĝi la alia?

La tempo pasas tiel rapide. Antŭ unu jaro en agrabla kaj bela somera vespero ni promenadis triope: Gunĉo Gunĉev, Ivan Lekov, docento de slava filologio ĉe la Stata Universiteto en Sofia, kaj mi. Ni interparolis gaje, intime, amike. Kiu povis supozi tiam, ke malantaŭ la plenenergia, viva kaj neniam forgesebla amiko kaj homo kaŝatendis la falĉilo de la morto, la malica, perfida kaj neniam satigebla morto, kiu inside kaj tute neatendite forrabas tion, kion la vivo per tiom da malfacilaj penoj konstruas kaj kreas? En la sama nokto nur kelkajn horojn pli malfrue G. Gunĉev ricevis la kruelan mortan frapon.

Lasta kaj neniam forgesebla nokto kun ankoraŭ pli neforgesebla amiko.

Ni parolis tiam kun li pri diversaj temoj: pri lia ŝatata scienca revuo „Arkivo por loĝadlokaj studoj", pri la milito kiu furiozas, pri la lingvo Esperanto al kiu Gunĉev restis amiko ĝis la lasta horo de sia vivo. Li tute ne similis al multaj aliaj bulgaras scienculoj kaj altranguloj, kiuj dum sia juneco estis fervoraj niaj samideanoj, sed poste forgesis tute la movadon kaj la ideon esperantistan. Tute ne! Ĝis la lasta horo de sia vivo Gunĉev restis bona amiko kaj subtenanto de la esperanto-movado kaj donis sian helpon kaj konsilojn por la prospero de la lingvo. Gunĉo Gunĉev, kiu en sia frua juneco entreprenis grandskalan societan laboron, kiu, ankoraŭ kiel lernanto en Pleven, komencis eldoni esperantan bibliotekon „Svetovnik" kaj vizitis internacian esperantistan kongreson en Helsinki, — ĝis la lasta horo de sia vivo restis fevora amiko kaj samideano. Vere, liaj sciencaj laboroj okupis lian tempon kaj li ne povis oferi ĝin por nia movado ; sed li vizitadis la vesperojn de la intelektuloj-esperantistoj, estis regula membro de la Sofia esperantista societo kaj abonanto de la organo Bulgara Esperantisto.

Gunĉo Gunĉev estis nobla homo kun honesta karaktero. Kiel scienculo li tre ŝatis sian sciencon, la geografion. Kiel bona patrioto li tre amis la ~~patrolandon~~ kaj skribis seriozajn verkojn pri diversaj regionoj de nia lando: Vakarel, Oreĥovo, Sofia, Gabrovo, Samokov.

La patrino de Gunĉo Gunĉev kaj liaj multnombraj gefratoj, en signo de sia granda amo al li, decidis daŭrigi la eldonadon de la fondita de Gunĉev serioza scienca revuo „Arkivo por loĝadlokaj studoj". Tiu ĉi revuo estas tre necesa precipe nun, kiam kreiĝas granda, vasta kaj potenca Bulgarujo, kiu etendiĝas de Nigra maro ĝis Ohrida lago kaj de Danubo ĝis Blanka (Egea) maro. La revuo nun respondas al urĝa nacia bezono, ĉar ĝi konatigos nin kun la pasinteco kaj estanteco de la belegaj regionoj de la unigita kaj feliĉa patrolando.

Okaze la unujara detreveno de la morto de Gunĉo Gunĉev, docento de gegrafio ĉe la Ŝtata Universitato en Sofia, la revuo „Arkivo por loĝadlokaj studoj" aperisen granda volumo de proksimume 300 paĝoj kun kolektitaj verkoj de Gunĉev. Estas enmetitaj ankaŭ artikoloj de prof. Iv. Batakliev (Gunĉo Gunĉev kiel antropogeografo), prof. Dim. Jaranov (La alportoj de Gunĉo Gunĉev por lernado de la geomorfologio de Bulgarujo), D-ro Iv. Dujĉev, (Gunĉo Gunĉev kiel arkeologo), Ignat Penkov (Gunĉo Gunĉev kiel instruanto kaj edukanto), Mihail Miĉev (La ekskursoj de Gunĉo Gunĉev), Petar Dinekov (Gunĉo Gunĉev kiel amiko kaj homo). La frato de G. Gunĉev, D-ro Zdravko Gunĉev, verkis biografion de sia frato. Tiu ĉi kolekto estas vera monumento por la neforgesebia amiko kaj samideano Gunĉo Gunĉev. Ĝi memorigos al ni, ke neniam revenos en niaj vicoj, neniam reapersos en nia medio unu belega homo, esperplena juna scienculo, neforgesebla amiko. Lia loko restos por longa tempo malplena. Sed en niaj koroj ni konservos lian neelviŝeblan bildon.

Ivan Sarafov

SKLAVINO

(bulgara popola kanto)

Tirano gvidis junan sklavinon,
Brute ŝin puŝis tra blanka prujno,
Kruele batis ŝian vizaĝon.
— Ĵetu do vian viran infanon!
Prenis sklavino sian ideton
Kaj faris por li klemat' — lulilon
Kaj ĝin pendigis sur du alnetojn.
En ĝin ŝi metis karan infanon,
Kaj lin eklulis, al li ekkantis:

— Dormu ho, dormu, kara infano,
Cia panj' estos bela montaro,
La ambaŭ alnoj — ciaj fratinoj;
Se vent' ekblovos, ĝi cin eklulos,
Se pluvo falos, ĝi cin ellavos,
Se cervin' venos, ĝi cin mamnutros.

Tradukis: *Dimitar Iv. Haĝiev*,
lernanto, Sevlievo

PAĜO DE NIAJ EKSTERLANDAJ KUNLABORANTOJ

JULIO BAGHY

Mondevoluo kaj lingvo neŭtrala

Foliumante la Historion oni konstatas, ke la antikva principo „se vi volas pacon, preparu vin por milito“ ĉiam rezultigis nur — militon. Postmilitaj periodoj de prospero kaj progreso instruas nin, ke la celo de la Vivo ne estas la milito. Jen



la sola konsolo en la batalo por la ekzisto. Milito estas ja kruela rimedo por renversi ion malnovan kaj por atingi ion novan. Ju pli vastiĝas la milito, des pli granda estas la fina celo.

La celo de la homa vivo komuna entenas klopodon al pil perfektaj formoj sociaj kaj internaciaj. La batalo daŭras senĉese jen per pacaj, jen per armilaj rimedoj. Ĉiufoje la bataltereno pli kaj pli vaste etendiĝas.

La hodiaŭa stato de la mondo montras, ke la Tero tre malgrandiĝis koncerne distancojn, interesojn. Nenio pli ol la nuna milito pruvas, ke paroli pri vivtereno kaj apartaj interesoj de unuopaj nacioj estas ioma anakronismo. Oni konstateble sentas, ke la komunaj interesoj por vivtereno de tuta kontinento iom post iom okupos la unuarangan lokon. El vidpunktoj de politiko, ekonomio kaj socia ordo la interesoj de iu kontinento formas ja komunan bezonaĵon por ĉiuj popoloj, vivantaj sur la sama kontinento. La grafika linio de la mondevoluo prezentas direkton, kiu montras al formiĝo de vastaj, kontinentaj vivterenoj ĝuste pro la altiĝo de la vivnivelo kaj parte pro la konservo de la valoroj kulturaj kaj civilizaciaj, atingitaj dum la lastaj jarcentoj. Tio ĉi estas nekontestebla.

Kompreneble la nova mondpercepto ankoraŭ embrie vivas en la utero de la estonto, sed ĝi jam vivas, evoluas kaj eble baldaŭ, post la nuna milita periodo aperos por postuli vivrajton por si. Sed la kristaliĝo de tiu nova mondpercepto bezonos daŭran pacan periodon por efiki kaj realigi ĉion, kio nun utopie skiziĝas antaŭ ni tra la nebuleca ĥaoso. La kristaligan periodon de la nova mondpercepto karakterizos (ĉar alimaniere la mon d percepto neniam povos fariĝi ĝenerale akceptita) la *aliformigita* principo antikva „se vi ne volas militon, preparu vin por paco“. Nur tiamaniene la estontaj gvidantoj povos certigi la prosperon de tuta kontinento, doni kontentigan vivnivelon al ĉiuj popoloj, formantaj la loĝantaron de la komuna vivtereno, teni ekvilibratan civilizacion kaj garantii la konservon de kulturoj, evoluiĝintaj aparte dum jarcentoj, sed en la nova epoko formantaj multkoloran tuton komunan, t. e. kontinentan. Nur kiam la nacio **X**, najbara al la nacio **Y**, havos absolute samajn interesojn kaj rajtojn kiel la nacio **Z**, okupanta teritorion for de ili sur la sama kontinento, sur la sama vivtereno, tiam kreiĝos tiu solidareco, kiu estigos unuecon, bezonatan por harmonia kunlaboro.

Sed kiel ajn varios ideoj dum la kristaliga periodo de la nova mondpercepto, tamen restos nevenkeble vivantaj tiuj idealoj kaj faktoroj, kiuj dum jarcentoj kaj ankaŭ nun nutras la rezistpovon de ĉiu nacio kaj stimulas ĝin al heroaj fortostreĉoj por firmigi kaj eternigi la vivon nacian. Mi mencias nur du el tiuj faktoroj: la nacia (popola) lingvo kaj ĝia memstara kulturo. Mi riskas aserti, ke post la nuna milita periodo la nacia sento eĉ pl

konscie kaj fortostreĉe klopodos fortikigi tiujn du bastionojn de la popola memstareco kaj nacia unueco tiom pli, ĉar en la vivprincipoj de la nun militantaj potencoj havas unuavican lokon ĝuste la — nacia sento, nacia unueco, nacia solidareco. Logike sekvas do, ke por ne rikolti fiaskon, la kontinenta rearanĝo, pli precize esprimite la *Nova Ordo* el vidpunktoj politika ekonomia kaj socia ne sole respektu, sed eĉ utiligu la — nacian senton, se tiu novaranĝo sincere celas harmonian kunlaboron por la komunaj interesoj de la kontinenta „komuna vivtereno".

Ĉi tie prezentiĝas ŝajne nesolvebla problemo, kiu malhelpus la sanan evoluon de la nova mondpercepto, reganta la estontan vivon de la kontinento. Nacia ingvo, kiel kreoforto de la unueco kaj solidareco kaj nacia kulturo, kiel konservanto kaj stimulilo de la popolspirito, samtempe formas ne forigeblajn limojn inter popoloj, kiujn historiaj jarcentoj destinis vivi kune sur la sama kontinento. Vere, la mondevoluo pliproksimigis la interesojn, eĉ kelkloke jam faris ilin absolute samaj kaj la Nova Ordo ja nepre bezonos komunan lingvon por glate funkcii. Sed kiamaniere solvi la problemon? Ĉu rezigni pri propra lingvo je favoro de iu fremda lingvo nacia kaj konsente akceptita? Pro kia ajn nova, eĉ edena periodo neniu popolo kulturita povos sekvi tiun vojon al la solvo de la problemo, ĉar tio signifus memvole elektitan vojon al neniiĝo, memmortigon de popolo, heroe batalinta dum jarcentoj por sia ekzisto. Vojon de rezigno pri propraj lingvo kaj kulturo neniu konscia popolo povas elekti! Ne! Milfoje ne! Eĉ kontraŭe, ĝis perforta ekstermo ĉiu kulturpopolo ĵaluze gardos ilin por konservi tiun kreoforton, kiun nacia lingvo kaj ĝia kulturo prezentas sur la multkolora kampo de la vivo. Kaj tiel estas ĝuste, kaj tiel devos okazi! Se la postmilita periodo alportus malzorgon, subpremon aŭ nur duarangecon de la naciaj lingvo kaj kulturo, tio signifus teruran kataklismon por ĉiu popolo senescepte sur la kontinento kaj la komunaj interesoj dronus en konstante elverŝata sango homa.

Sed tio ne okazos, ĉar la teknikaj aranĝoj faciligos la mondevoluon kaj la nova mondpercepto teknike solvos ankaŭ ĉi tiun problemon.

Kio estas lingvo sen epitetoj „popola, nacia"? Teknikaĵo, farita de homoj por komuniki pensojn, ideojn. Homfarita teknikaĵo neheredebla. Infano ne heredas, sed lernas sian unuan lingvon, kelkfoje eĉ ne tiun de la gepatroj. Kion infano heredas, tio montras lian familian devenon en striktaj trajtoj kaj en pli vasta observo oni povas rekoni en li la karakterizajn trajtojn de gento aŭ popolo, al kiu liaj gepatroj apartenas. La vizaĝo de la prauloj respeguliĝas en la trajtoj de la posteulo, kaj ne ilia lingvo. La genta, popola naturo reliefiĝas en la infano kaj ne la idiomo, parolata de la gepatroj. El tio logike sekvas, ke lingvo, kiel simpla teknikaĵo, ne influas la rasan, gentan, popolan apartenecon de la individuo. Do lingvo, kiel nura teknikaĵo, neniel povas malpliigi la gravecon de iu nacio kaj neniel povos subpremi ĝian lingvon kaj memstaran kulturon.

La ŝajne nesolvebla problemo fariĝos tuj solvita, kiam oni aplikos lingvon, kiel teknikaĵon, por uzo internacia. Ĉiu inteligenta kapo komprenas, ke tiu lingvo ne povos esti — „nacia propraĵo" por eviti ĵaluzon kaj kruelan konkuron inter potencaj lingvoj naciaj kaj ĝi ne povos aparteni al la lingvoj mortintaj por esti vere taŭga al modernaj bezonoj. Tiu teknikaĵo povos esti sole — lingvo neŭtrala. Mem la mondevoluo bezonas tiun idiomon neŭtralan, ĉar la interesoj de la kontinento, la komuna patrujo de tiom da kulturnacioj, postulas ĝin:

1) por sukcese defendi kontraŭ subprema influo de kiu ajn nacia lingvo la proprajn naciajn lingvon kaj kulturon,

2) por utile konatigi la valorojn spiritajn kaj materialajn de ĉiu nacio, apartenanta al la komuna vivtereno,

3) por krei tian literaturan fonton, en kiu respeguliĝas la kulturtrajtoj de la tuta kontinento,

4) por popularigi ideojn pri la novaranĝo inter la milionoj da unulingvuloj, kiuj ne emas aŭ ne kapablas lerni frem-

dan lingvon nacian parte pro principo (tute komprenebla), parte pro gramatikaj malfacilaĵoj kaj manko de tempo kaj okazo,

5) por akceli harmonian kunlaboron inter la nacioj, kiujn komunaj interesoj ligas unu al alia kaj kiuj tamen ne ĉesus ĵaluze protesti kontraŭ kiu ajn altrudita lingvo nacia en internacia uzado,

6) kaj fine por konservi tiun pacon, tiun Novan Ordon, kiun la nova mondpercepto jam kristaliĝinta kreis sur la etika kampo de la kontinenta politiko kaj sur tiu de la novaj aranĝoj socia kaj ekonomia.

Tia neŭtrala lingvo, tia teknikaĵo moderna jam ekzistas: Esperanto. Ĝi ne estas utopio, sed vivanta realaĵo: la solvita problemo de la lingvo neŭtrala por internacia uzo. Ĝi pruvis jam sian praktikecon kaj vivantecon per mil kaj mil faktoj sur ĉiu kampo de la homa vivo kultura. Se ĝi ne ekzistus, se ĝi ne posedus ĉiujn premisojn, kiuj rajtigas ĝin por la vivo, oni devus krei tian idiomon neŭtralan por venki la baron, formitan de la diverslingveco. Se ĝi ne estus jam aplikebla realaĵo, sed nura utopio, oni devus fortostreĉe labori por fari ĝin sur simpla gramatika bazo el tiu vorttrezoro internacia, kiun ĉiu kulturnacio havas en sia literaturo, precipe ĵurnala. Sed por fari taŭgan lingvon neŭtralan (ekzistis ja eksperimentaj projektoj pil ol 500!) oni bezonas por vivantigo tempon kaj entuziasmajn homojn. Do nun ia projekto nova estus vana eksperimento, ĉar la vivo mem elektis Esperanton el tiom da projektoj, faritaj en la retortoj de lingvistoj. Esperanto estas iniciato de unu geniulo, sed verdire ĝi estas kreaĵo de tiuj multaj centmiloj da entuziasmaj homoj sur la tuta tergolobo, kiuj kulturis tiun neŭtralan idiomon, uzis ĝin praktike kaj per tio preparis la vojon de la mondevoluo.

Budapest, 31. I. 1941.

Julio Baghy,
vicprezidanto de la Esperanto Akademio

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

ESPERANTINA R. TRIĈKOVA

Renkonto

Jam vesperiĝas. La lasta kanonpafo skuis la aeron. La eĥo ĝin ripetis kelkfoje kaj post tio estiĝis misprofeta silento. La francoj estis venkitaj kaj retiriĝis en malordo. La germanoj antaŭeniris rapide kaj larĝfronte. La kamparo kaj la fumanta arbaro apud Saint Omer, Lotaringio, estis sursemitaj per mortigitoj kaj vunditoj. Malbonodoris je morto kaj kadavroj. La germanaj sanitaristoj rapidis kolekti la plej-grave vunditajn soldatojn kaj doni al ili la unuan helpon. Ĉi-foje ili devis multe kaj pene labori

Subite el la proksima valo de l' arbaro aperis komplete armita germana soldato. Laŭ ĉio vidiĝis, ke li misorientiĝis en la arbaro kaj nun rapidis kuratingi sian taĉmenton. Li iris pene, kun kapo klinita, timeme ĉirkaŭobservis kaj abomene rigardis la fruktojn de l'milito. Forta animangoro turmentis lin je la vido de la sennombraj viktimoj, sennomaj patroj kaj fratoj, certe atendataj kortreme de siaj gehejmanoj kaj proksimuloj.

Neatendinte li aŭdis obtuzan ĝemon. Helponpetantan voĉon, en nekomprenebla por li fremdlingvo. La germano direktiĝis al la voĉo aŭdata kaj haltis antaŭ grave vundita franca soldato. Lia germana koro flustris kompaton malgraŭ ke ili estis „malamikoj". Li proksimiĝis. La vundito peze ekĝemis kaj obtuze elparolis ion en sia lingvo. Nekompreninte la diraĵon, la germano genufleksis antaŭ li, kliniĝis proksime al lia vizaĝo kaj demandis en germana lingvo.

— Ĉu vi estas vundita, fraĉjo? Per kio mi helpus vin?

La vundito, apenaŭ malfermis siajn peziĝintajn palpebrojn kaj reekparolis ion

nekompreneblan. La germano ne scipovis la francan, nek la franco — la germanan lingvon. Ili ne povis interkompreniĝi.

Subita penso, kiel fulmo trakuris la cerbon de la germano kaj li redemandis en Esperanto. (Li parolis tiun ĉi lingvon, kvankam ĝi estis malpermesita en Germanujo).

— Ĉu vi estas vundita, kamarado, kaj per kio mi helpus vin? — demandis li per tremanta voĉo en flua kaj belsona Esperanto.

Momente la vizaĝo de la franco heliĝis, kaj en liaj okuloj ekbrulis hela kaj ĝoja flameto.

— Jes, fraĉjo! Donu al mi iomete da akvo, — ripetis li en la sama lingvo.

La germano tuj alcelis la plenan soldatakvujon al la brulantaj lipoj de la franco, kiu soife kaj longe trinkis.

— Dankon, fraĉjo. Mi tutkore dankas al vi. Kia stranga renkonto! Anstataŭ ĉe kongreso en Marseille . . . ĉi-tie . . . en la arbaro . . . ĉe simila medio . . . Kia ŝerco de la sorto! . . .

La germano komprenis, ke oni perdas valoran tempon kaj redemandis:

— Fraĉjo, vi estas serioze vundita. Kie estas la vundo, por ke mi bandaĝu ĝin?

Ne estas plu necese . . . Jam malfrue . . . Senespere ja estas, mi mortas... Mi ĝin antaŭsentas . . .

Kaj la bluaj bonanimaj okuloj de la franco pleniĝis per larmoj. Li ploris silente. La germano ekprovis lin konsoli.

— Ne, ne! . . . senutile plu estas konsoli min, fraĉjo! . . . Ĉio estas finita . . . Mi mortas, tamen, proksime ĉe siulo . . . samideano . . . Almenaŭ mi estas feliĉa . . . ke je mia morthoro ĉeestos vi . . . proksimulo . . . Kvankam „malamikoj", ni estas fratoj . . . Jes, mi sentas tion . . .

La brusto de l'mortonto pene moviĝis. El ĉio vidiĝis, ke li faras lastajn penojn paroli, sed daŭrigis:

— Aŭdu, fraĉjo! . . . En tiu-ĉi momento vi ĵuru al mi . . . ke vi plenumos mian peton . . . lastan peton de mortanto . . . Ŝovu vian manon en mian poŝon! . . . Jen ĉi-tien . . . dekstre! . . .

La germana soldato per tremantaj manoj malbutonumis lian soldatjakon kaj elprenis el lia dekstra poŝo rozkoloran koverton. De ĝi falis teren letero kun portreto de virino kaj du infanoj. Sur la koverto oni vidis adreson skribitan per bela kaj nete-legebla virina manskribo: *Henri Thiard k. t. p.* La germano eksciis la nomon de l'vundito, kiu prenis la foton kaj varme kisis la bildojn de siaj proksimuloj, redonis ĝin al la germano kaj singultante diris:

— Vi jam scias mian nomon . . . Interne estas la adreso . . . de miaj . . . Mia fino jam alvenas . . . Mi estas el Lyon . . . Post mia morto . . . estu tiel afabla, plenumu mian peton . . . Diru al miaj familianoj . . . ke ilia kara paĉjo. . . sendas al ili sian . . . lastan kison kaj. . . karesas iliajn orajn harojn. . . Diru al ili... ke li mortis apud homo. . . . proksimulo . . . kiu feliĉigis lin antaŭ la morthoro. . . Ili parolas Esperanton . . . Mia edzino estas estonino . . . Ni konatiĝis en Danzig . . . dum universala kongreso . . .

Torento da larmoj fluadis el la okuloj de la franco ĉe la rememoro pri liaj familianoj. Li pene daŭrigis:

— Promesu, ke trapasonte Lyon, vi plenumos mian lastan peton . . . Se vi ne trovos ilin tie . . . promesu. . . elserĉi ilin kaj . . . estu ilia amiko . . . Alimaniere . . . ili nenion ekscios pri mia morto . . . Vere, estas nenecese . . . sed mi volus scii vian nomon . . .

La germano ankaŭ ploris. Li kaptis ambaŭ manojn de Henri en la siaj kaj sufokiĝante pro singultado kaj ploro ek flustris:

— *Arthur. Arthur Just,* el Düsseldorf. Mi promesas. Mi ĵuras al vi.

La vizaĝo de la franco ekradiis. Li ne returnis sian noblan rigardon de l'okuloj de la germano. Kun lasta peno kaj peze spirante il apenaŭ rekomencis:

— Dankon! . . . Kaj . . . por vi . . . tion-ĉi . . . .

Per lasta gesto li demetis de sur sia maldekstra brustflanko malgrandan verdan steleton — la emblemo de la esperantistoj kaj la simbolo de l'internacia frateco, solidareco kaj interkompreniĝo. Sur ĝia emajlo briletis du gutoj da sango. Kun eksterhomaj penegoj kaj apenaŭ spirante il findiris:

— Tio . . . rememorigos . . al vi . . . pri nia . . . unua . . . kaj lasta . . . renkontiĝo . . .

Li ne findiris. Arthur Just ne komprenis ĉu bondeziron li eldiris, aŭ malbenon. Obtuza ekspiro eliĝis el lia buŝo, lia kapo defalis kaj li mortis en la manoj de la germano.

Super li Arthur silente ploris. Kaj ne kiel malamiko, sed siel frato kaj amiko. En sia tremanta mano li tenis la verdan steleton kaj mediteme, apenaŭ aŭdeble li ripetadis:

— Mi ĵuras! Se mi restus vivanta, mi plenumos vian lastan peton, fraĉjo. Dormu trankvile! Viaj familanoj, almenaŭ, scios kie estas via tombo.

* * *

En la arbaro de Saint Omer, sur la malvasta gazono, en la kavaĵo, elfosita de la fatala germana obuso, kiu senigis Thiard je la vivo, nun elstaras freŝa tombo kronita per velkiĝintaj arbarfloroj. Super ĝi, etendante la manojn, staras simpla tabulkruco kun surskribo, ĉizita zorge per ordinara poŝtranĉileto:

Al
Henri Thiard,
franco,

de lia kamarado esperantisto.
Arthur Just,
germano.

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA KROATA LITERATURO

MIROSLAV KRLEĴA

Poemoj en prozo

Kanto en printempa nokto

Venas printempo kaj tion oni sentas laŭ vibrado de strataj lanternoj kaj laŭ profundo de la spaco kaj laŭ verŝado de varma nebulo tra la urbaj stratoj. La rivera vaporo estas kiel varma fumo kaj tra ĝi naĝas domegoj kvazaŭ surteriĝintaj ŝipoj kun estingitaj vitroj; blueta varma vaporo rondiras ĉirkaŭ la ŝipoj en horizontaloj. Venas printempo, graveda kun novaj travivaĵoj kaj peza kiel piedirejo de malĝojo kaj ĉagreno. En tiu ĉi printempo aŭdiĝas nek reeĥo de kentaŭra krio, nek sono de fluto. Tio ĉi ne estas printempo harmonia kaj granda kiel la bildoj laŭ kiuj oni lernigas al infanoj elementojn de jarsezonoj. Sur la lernejaj bildoj plugistoj plugas, riveretoj flustras kaj hirundoj rondflugas ĉirkaŭ la blanka, kalkumita preĝejturo. Sur tiuj bildoj ĉio okazas laŭ simpla kaj klara leĝo, kiel la simplaj frazoj en la infanaj kajeroj: neĝo degelas, hirundoj revenas. Nenio el tio ekzikstas en la alveno de tiu ĉi printempo kaj ĉio estas kruda kaj frakasita. Venas printempo kiel blindulo en la malplena strato: la strato estas malplena kaj el malproksime audiĝas paŝo malfirma kaj lama. Tra neĝa koto palpiras la blindulo, ŝanceliĝante ebrie kaj peze. Li palpserĉas la vojon per la bastono kaj maĉante estingiĝintan cigaron, ridetas laŭte. Nigra hundeto flaras postsignon de la blindulo kaj gaje svingas per la vosto. Kaj ĉiuj vitroj estas nigraj kaj ĉiuj pordoj estas ŝlositaj. Oni aŭdas e akvon gutantan en lada defluilo.

Sopiro

Tio okazas en la aŭtuna nokto, kiam kaŝtanoj falas sur la asfalton, kaj kiam aŭdiĝas hundoj en malproksimo, kaj kiam tiel nepriskribeble aperas sopiro pri iu, kiu estus bona, nia, proksimeca, intima kamarado kaj al kiu ni povus skribi leteron Ni konfesus al li ĉion kio kuŝas en ni. Leteron ni skribus al li, sed li ne ekzistas.

El la kroata: *Josip Grandja*

SILVIJE STRAHIMIR KRANJCEVIC

VIZIO

Ne, car' ne kroniĝas, kaj Dio ne estas
Preĝata. La sonorilo sonoras.
Rusujo sub turo de Johano la Granda
En la fumo nigra jen ĥoras.

La fumo leviĝas sur pordoj de Kremlj —
Kiel de sankta urbo frostĝemado.
Vasilio Beata teruran tagon sonĝas:
Urĝe kreskas la barikado.

Ne, car' ne kroniĝas, kaj Dio ne estas
Preĝata. Rusujo aŭskultetas pri sono,
Antaŭ ĝi — la tombejo senfina;
Eĉ car' Kolokol ŝanceliĝas sur trono.

Jen iras la ombroj el nigra subtero.
En longa vico sekvas legio legion.
Al ili Dio donacis la stelojn,
Kaj car-patro: kuglojn, ŝnurojn, Siberion.

Kaj longa vico ilia de la Ruĝa Placo
La fenestrojn de Kremlj rigardas malpace.
Aĥ, ĉu Gerasim estas tiu homo
Sin levinta kaj rigardanta minace?

Jes, li leviĝis el putra kuŝejo,
Li sklavo malŝatita mutalange,
Kaj nun rigardas en la rusan nokton,
Ho, tiel strange... strange... strange...

Aŭskultu, kvazaŭ io peza
Frapis sur Pordon de l' savo proksime,
Kaj firmapaŝe kvazaŭ jen eliris
Raskolnikov ridete kaj sentime.

Kaj rigardante en la longan vicon,
En kiu multajn korojn dolor' suĉis,
Li ekkriis en la rusan nokton:
„La virinaĉon sangan mi mortbuĉis!“

El la kroata: *Josip Grandja*

ALIJA NAMETAK

Okaze de Vojaĝo

En Hum ni transiras el unu vagonaro en la alian, mi kaj sep virinoj. Mi estas nenia poligamo, sed tiom da virinoj troviaĝas nun kun mi: unu — mia edzino, du miaj filinoj, du miaj parencinoj kaj du pli aĝaj virinoj — la patrino kaj la fratino de mia samlokano kaj amiko Hamza en Podgorica. Kun aĵoj, kiujn ni portas kun ni en malproksiman regionon, ni okupis tutan kupeon. La patrino de Hamza senŝarĝis sin kaj sidiĝis sur la sidlokon. Ŝi kondutas kiel hejme. Kvakam sepdekjara si pacience toleras sidbretojn de la tria klaso de Mostar ĝis Tredinje. Vidvlno, ŝi havas sep filojn, du filinojn kaj nur unu koron, kiu batas egale por ĉiuj, ŝi volus, ke ĉiuj estu bonaj, ke ĉiuj estu kun ŝi, sed tio ne povas okazi. Tri filoj restis sur la patra bieno kaj kulturas teron, unu formigris en Turkujon, kaj tri estas oficistoj. — Modernaj ciganoj. Nun tie ĉi ili levis tendon, sed, ankoraŭ ne varmiginte sin sur unu loko, ili jam devas translokigi ĝin alien. Ofico vokas ilin, kaj ili forlasis la patran bienon, kiu apenaŭ nutras tri frafojn. La patrino ne povas ilin grupigi ĉirkaŭ si kaj vojaĝas al ili, de unu al alia. Ĉi-foje ŝi estas mia kunvojaĝantino, ĉar mi kaj Hamza oficas en la sama loko.

La vagonaro moviĝas kaj bruegas tra la karsto kun eta dornarbustaro. Estas frua mateno. Ni preterveturas brutejojn, el kiuj kaprinoj eliris paŝti, malgrandajn ĝardenojn el kiuj jam estas forportita modesta rikoltaĵo kaj kiuj nun similas al malplenaj kaj nelavitaj pladoj. Sur ia amaso staras ĉasisto kun du-tuba pafilo sur la ŝultro kaj kun leporo en la mano. En la stacidomoj, ĉirkaŭ vagonoj de la kvara klaso, premiĝas homoj en dimanĉaj vestoj, pro la preĝejo.

Jam en Hum eniris en nian kupeon ia mezaĝa homo. Kun fezo sur la kapo. Kun bluaj okuloj. Ni tuj interkonatiĝis kaj informiĝis pri la sano. Li vojaĝas el Zelenika, kaj, tra Hum, al Tredinje, hejmen. En Boka Kotorska li partoprenis manovrojn dekkvin tagajn, kiel rezervsoldato, kaj nun revenas.

— Tamen du filojn mi havas en soldatservo, li diras — Sed ja tia estas la ordo.

— Vi ebie servis ĉe l'artilerio? — mi demandas lin.

— Jes. Oni montris al mi povajn kanonsistemojn. — Kaj kun ia supereco rilate al ni, civiluloj, li aldonas: — Kvazaŭ ni, malnovaj soldatoj, ne scius tion. Mia frato, kia kanonpafisto mi estis en la Granda Milito!

Feliĉe ankaŭ ĝendarmo eniris en la kupeon. Li kontrolis mian legitimilon kaj tiam komencis interparolon kun mia hazarda renkontito, rezervsoldato, kiun li bone konas, ĉar ambaŭ loĝas en Trebinje.

— Nu, kiel estis en la manovroj?

— Bonege. Sed ĉu ni, malnovaj soldatoj, nepre bezonis iri? Ni eĉ tiel ĉion scias! — fiere li manfrapas sian bruston — Vi konas Omanoviĉ ankoraŭ el la tempo de l'aŭstria regado. Ne ekzistis celo, kiun li ne estus trafinta. Ankaŭ nun li ĉiufoje trafis. Vera miraklo.

— Kiu? Ĉu mi? Hm! — Kvazaŭ kun indigno li demandas, volante jam per tono de sia demando montri, ke en pafado li egalas al Omanoviĉ, kaj ke la demando estis superflua. „Sinjor kolonelo demanais la ĉefserĝe ton, kiu staris antaŭ ni, rezervsoldatoj: „Diru al mi jenon: Malamika armeo troviĝas tricent metrojn malproksime de ni. Kien vi pafus?" — „Ĝuste en ĝin, sinjor'kolonelo". „Ne" — diras li. „Kien vi pafus?" li demandis min. „Mi pafus, siujor'kolonelo, diras mi, je duona distanco inter malamiko kaj nia baterio". „Brave"! li diras, frapetante mian ŝultron.

— Jes. Jes, tiel estas — konfesas ankaŭ la ĝendarmo. — Ankaŭ li respondus tiel, se la demando estus direktita al li.

— He, kiel ni estis entuziasmaj! Krome la kolonelo estas bonega homo, bonega! Kiam la manovroj finiĝis, Omanoviĉ diris al sinjor'kolonelo: „Se nur estus milito, vi vidus kion ni valoras. Dio donu

sinjor'kolonelo, ke dum dekkvin tagoj ekestu milito!" Kaj sinjor'kolonelo nur frapetis lian ŝultron.

— Ne donu Dio, filo — flustras la patrino de Hamza, la maljuna Hasanaginica, kiu sidas apud mi kaj fumas cigaredon. Ne donu kara Dio. Kia milito! Eĉ paroli pri ĝi ne estas bele.

Mi sidis kaj pensis. Li havas du filojn en soldatservo kaj mem entuziaste rakontas pri milito kaj pri tio kiel li scius bonege kanonpafi, por ke kiom eble plej multe da malamikoj falu. Kaj kiuj estas liaj malamikoj? Kamparanoj, kiuj semas rizon, turmentiĝas kaj pene vivas sian vivon, metiistoj kaj etkomercistoj, kiuj apenaŭ akiras tiom kiom sufiĉas por viveti. Kaj kiu estas li kaj liaj kamaradoj, kiuj batalos ŝultro-ĉe-ŝultre? Pro kio ili fariĝos malamikoj de liaj malamikoj, nur kiam ili staras uj kontraŭ la aliaj kun pafilo, mitralilo, mbo aŭ bajoneto en la mano? Li estas ŝu o, tiu, kiu staras apud li — lignaĵisto, plue — terkulturisto, razisto kaj buĉisto. Kaj kio ili estas unuj al la aliaj en la paco? Fratoj en laboro, en negoco, en penado, klopodantaj fari tiun ci vivon pli tolerebla.

La vagonaro haltas kaj ni eliras. Ni transiras en aŭtomobilon. Kaj nun ni veturos en la montojn. Jen iama limo inter du ŝtatoj, dum la milito du poboloj, du malamikoj. Karsto, nuda karsto, sen dornarbustaro, sen io ajn. En unu valo modesta maŭzoleo. Mi jam plurfoje veturis tra tiu ĉi regiono kaj scias kie io okazis, kaj nun mi rakontas al la aŭskultantoj en la aŭtomobilo por deturni ilian atenton de stomakaj malsanoj.

— Tra tiu herbejo unu matenon Montenegranoj faris atakon, kaj tie ĉi kaŝiĝintaj Aŭstrioj mortigis ĉiujn per maŝinpafiloj. Eĉ unu ne restis, kiu povus forporti sciigon pri la okazintaĵo. Post la milito oni kolektis la disĵetitajn ostojn kaj enterigis ilin tien ĉi. Kaj multaj estis. Pli ol ducent.

— Ho kompatindaj iliaj patrinoj, kiuj ĝisvivis tian perdon de siaj filoj! — flustras Hasanaginica kompate.

— Montenegraninoj ili ja estas, ne mahometaninoj — diras la ŝoforo.

— Ah, filo, ne faru pekon. Ankaŭ ili estas patrinoj.

Ni pli kaj pli suprenveturis kaj mi pensis pri tiuj ĉi du kontrastoj: pri la patro, kiu havas du filojn en soldatservo, kiu mem estas rezervsoldato kaj kiu mortigus homojn, kiuj faras al li nenion malbonan; kaj pri la patrino, kiu bedaŭras ducent pereintajn homojn, naskiĝintajn transe de nia limo, ĉar historio tiel volis Ili ja estis niaj malamikoj en la milito, dum en la paco ni kaj ili vivis penan vivon en tiu ĉi tiel avara karsto. Mi pensis pri du malsimilaj animoj kun pli aŭ malpli da atavisma heredo.

El la kroata: *Josip Grandja*

Notoj pri la aŭtoroj. *Silvije Strahimir Kranjĉeviĉ* (1865 — 1908) naskiĝis en Senj. Fariĝinte instruisto, li oficis en pluraj lokoj en Bosnujo kaj estis redaktoro de la literatura revuo „Nada" (Espero) en Sarajevo. Komence lia poezio estis patriota kaj sub influo de romantismo, sed baldaŭ ĝi fariĝis revoluciema kaj plena je protesto kontraŭ sociaj maljustoj. En la lasta periodo de sia vivo li falis sub influo de filozofia pesimismo kaj lia poezio el tiu tempo estas plena de malhela pesimismo.

Li estas unu el la plej signifaj kroataj poetoj.

Miroslav Krleĵa (1893. —) La plej signifa kroata verkisto. Redaktoro de pluraj progresemaj kaj batalemaj revuoj („Flamo", „Literatura respubliko", „Hodiaŭ," kaj nune „Sigelo"). Lia verkado estas multflanka: dramoj, noveloj, romanoj, eseoj, liriko, poemoj en prozo, polemikoj ktp. La plej gravaj verkoj estas: „Sinjoroj Glembay", „Golgoto", „En agonio" (dramoj), „Reveno de Filip Latinowicz", „Bankedo en Blitvio" (romanoj), „Tri simfonioj", „Baladoj de Petrica Kerempuh" (poemoj), „Eseoj", „Europo hodiaŭ" (eseoj) k. a. Lia primilita novelaro: „Kroata dio Marso" estas unu el la plej bonaj kontraŭmilitaj verkoj en la mondliteraturo.

Li naskiĝis kaj vivas en Zagreb.

Alija Nametak. (1908.—) Gimnazia profesoro. Unu el la pli junaj kroataj verkistoj en Bosnujo. En siaj noveloj li priskribas la vivon de bosnaj mahometanoj.

Verkoj: „Bajram (reviviĝo) de viktimoj" kaj „Bonaj bosnoj" (novelaro).

VIZITU BULGARUJON!

Mineralakvoj en Bulgarujo

(daŭrigo)

Ovĉa kupel.

Tiu ĉi mineralakva banejo troviĝas nur 6 klm. sudokcidente de Sofia, survoje al Knjaĵevo. Ĝia alteco atingas 950 m. super la marnivelo. La banejo estas la plej moderna bankonstruaĵo en Bulgarujo, kun ĉiuj modernaj instalaĵoj por akvokuracado. Ĉirkaŭ la banejo etendiĝas vasta parko por promenado kaj amuzoj. La vizitantoj havas la eblecon loĝi en Sofia pro la proksimeco kaj pro la regulaj tram-kaj aŭtokomunikoj. Najbare de la banejo mem troviĝas privataj vilaoj, luludonataj dum la sezono.

La akvo de Ovĉa-kupel estas unu el la plej kuracaj. Ĝi havas klaran senkoloran aspekton alkalian guston, malfortan odoron de sulfurhidrogeno, kaj fortan mineralecon. Temperaturo 31·5°C. Laŭ sia radioemano tiu ĉi mineralakvo estas la unua en la lando.

Gorna banja.

Je 12 klm. de Sofia. Regulaj fervojoj, tram- kaj aŭtokomunikoj. 660 m. super marnivelo. Bonorda bankonstruaĵo. Temperaturo de la mineralakvo: 41·4°C. La fonto donas 140 litrojn po minute. Tiu ĉi akvo sukcese kuracas malsanojn de stomako, intestoj, renoj kaj galo, reŭmatismon k. a.

La banejo estas malfermita dum la tuta jaro.

Sofia.

Sofia, la bulgara ĉefurbo, estas la sola ĉefurbo en Eŭropo, kiu dank' al sia klimato, kuracaj mineralakvaj fontoj kaj najbaraj mineralbanejoj (Gorna banja, Knjaĵevo, Banki, Panĉarevo, Ovĉa kupel) estas kuracloko kun ĉiuj premisoj de komforta kaj tamen tre malkara vivo. Sofia etendiĝas meze de la alta Sofia Kampo (550 m. super la marnivelo), de ĉiuj flankoj ĉirkaŭita de belaj, arbarkovritaj montaroj.

La mineralfontoj troviĝas en la centro mem de la urbo. Moderna konstruaĵo kun du fakoj: por viroj kaj por virinoj. Speciala fizioterapia instituto kun modernaj instalaĵoj. La temperaturo de la akvo estas 47°C, kaj la debito—704 litroj po minute.

Proksime de Sofia troviĝas la fame konata somerrestadejo Ĉam Korija, meze de pinarbaro en Rila-montaro.

Mineralbanejoj en la baseno de Ĉepino

En la sino de l'okcidenta Rodop-masivo, sude de la stacio Sarambej (sur la fervojlinio Paris-Wien-Budapest-Beograd-Sofia-Istanbul) troviĝas baseno de Ĉepino, fama pro sia beleco kaj riĉa je varmaj mineralakvaj fontoj. Tiu ĉi baseno estas ĉirkaŭita ĉiuflanke de montoj kun pinarbaroj kaj paŝtejoj. Prave oni komparas ĝin al Svislando, kiun ĝi superas per sia milda klimato, mineralakvoj kaj malkara vivo. Tie ĉi troviĝas tre bone aranĝitaj somerrestadejoj: Banja Ĉepino, Lăĝane kaj Kamenica.

Banja-Ĉepino estas unu el la maloftaj kuraclokoj kunigantaj ĉiujn ĉarmojn de la naturo: freŝa pinarbara aero, abundo de kristala akvo kaj multnombraj mineralfontoj kun du modernaj banejoj, ĉiuspecaj instalaĵoj kaj komforto. La vilaĝo mem troviĝas en la sudokcidenta parto de la Ĉepino-baseno, 750 m. super la marnivelo, cirkaŭita de pinarbaroj. Meze de la vilaĝo fluas vigla montrivero, kiu refreŝigas la aeron. Proksime elsub la montrokoj ŝprucas la fama fonto „Kleptuza", kies akvo somere estas glaciemalvarma. Ĉirkaŭe estas ŝatataj lokoj de la someraj vizitantoj.

Sezono: de la 15. de junio ĝis fino de septembro.

Lâĝane (mineralbanejoj kaj montara kuracloko) estas ĉarma angulo en la sino de Rodop-montaro. Krom kuracloko kun mineralbanejoj ĝi havas ankaŭ sanatorion por tuberkulozaj malsanuloj.

La akvo de la porvirina banejo havas temperaturon 53°C. Trinkate ĝi for-

tigas la digestadon kaj kuracas stomakkataron. Dum banado ĝi pacigas la nervan sistemon, kuracas reŭmatismon, haŭtmalsanojn, virinseksajn malsanojn k.a.

La porvira banejo havas temperaturon de la akvo 62°C. Ĝi kuracas reŭmatismon de la artikoj kaj muskoloj, neŭralgion, podagron, sablon en la renoj aŭ en la hepato, stomakmalsanojn ktp.

Kamenica — troviĝas je 600 m. de la fervojstacio Lâĝane kaj estas konata per siaj mineralbanejoj. La banejo de Kamenica sukcese kuracas malsanojn de spirorganoj, kronikan kataron, malsanojn de seksorganoj, ĉiujn specojn de reŭmatismo (osta, artika kaj muskola).

Kjustendil.

La distrikta urbo Kjustendil troviĝas meze de bela kamparo, dronanta en verdaĵo kaj fruktĝardenoj. Kjustendil estas ankaŭ riĉe dotita per mineralfontoj kaj havas plej modermajn bankonstruaĵojn kun ĉiuspecaj instalaĵoj.

Dank' al la tre milda klimato la kuracsezono komenciĝas de frua printenpo kaj daŭras ĝis malfrua aŭtuno.

La mineralakvo kuracas malsanojn de spiradorganoj, de naskorganoj, reŭmatismon skrofolon, k. a. Tiujn ĉi banejojn oni ne rekomendas al nervmalsanuloj. Temperaturo de la akvo: 72°C.

Kustendil estas ne nur unu el la plej bone aranĝitaj, sed ankaŭ unu el la plemalkaraj bulgaraj kuraclokoj. Precipe malaltaj estas .a luprezoj. La ĉirkaŭaĵoj de la urbo, kaj speciale „Hisarlăk", prezentas belan naturan parkon. Oni ekskursas aŭtobuse ĝis la fama Rila-monaĥejo. Kjustenjdil estas konata ankaŭ per siaj fruktoj: prunoj, pomoj, piroj, nuksoj kaj vinberoj.

Nia vivo

Funebra ceremonio. Okaze de l'unujara datreveno post la morto de nia fervora samideano Gnuĉo Gunĉev, juna bulgara scienculo kaj docento de geografio ĉe la Ŝtata Universitato, la 9-an de junio liaj kolegoj kaj amikoj kunvenis apud lia tombejo. Okazis memoriga diservo. Multaj universitatanoj, intelektuloj, parencoj kaj esperantistoj ĉeestis la funebran ceremonion.

Distingiĝo. Nia samideano kaj kunlaboranto Petar Dinekov, talenta bulgara verkisto, estas ĵus nomita kiel ordinara docento ĉe la katedro de slava filologio en la Ŝtata Universitato. Ni gratulas nian amikon pro lia meritplena sukceso. En unu el la sekvontaj n-roj ni presigos artikolon verkitan de li speciale por „Bulgara Esperantisto".

Statistiko. La statistika servo de la Esperanto-movado jam regule funkcias. Ni ricevis multajn leterojn de samideanoj el diversaj lokoj. Ni ankoraŭ insistas pri la graveco de tiu ĉi servo por nia estonta propaganda laboro, kiu devas esti gvidata laŭ scienca metodo. Ĉiuj esperantistoj helpu!

Adreso: Dro Cvetan Stajkov, Bul. Bauĉer 24, Sofia.

Ĝis nun la jenaj samideanoj sendis plej kompletajn listojn kun adresoj:

Hikola Mihailov Stojanov, el vilaĝo Sredec, distr. Burgas (62 adresoj);

Petar Vasilev Ĉernokožev, vil Borima, Trojansko (32 adresoj).

Vasil L. Uzunov, vil. Dalbok Dol, Trojansko (28 adresoj).

Bogomil Radoslavov, vil. Zlatarica, Elensko (15 adresoj).

Koran dankon pro ilia esperantista fervoro!

Avizo. La redakcio bezonas konstantajn korespondantojn el ĉiuj lokoj (urboj kaj vilaĝoj) de Bulgarujo. Samideanoj, kiuj deziras faciligi nian taskon, bonvolu **regule** sendi al la redakcio de Bulgara Esperantisto koncizajn informojn pri sciindaĵoj el la esparantista vivo de sia loko.

Fianĉiĝo. La 24-an de majo fianĉiĝis f-ino Spaska Hristova Volovarova kun s-ano Mihail Hr. Danĉev — Etropole. Niajn gratulojn kaj bondezirojn!

Varna. Funkcias kurso por progresintoj gvidata de Veska Skolufanova kaj Violin Oljanov. Regulaj ĉiudimanĉaj ekskursoj. Je la 24-a kaj la 25-a de Majo ni faris ekskurson al Balĉik. Tie ni renkontiĝis kun gesamideanoj el Kavarna, kiuj estis avertitaj pri nia alveno. La renkonto estis tre entuziasma kaj ĝoja. Ni decidis en baldaŭa tempo organizi novan renkonton de la gesamideanoj el Varna, Kavarna kaj Balĉik en la loko „Uzumkum“ (Oraj sabloj), situita inter Varna kaj Balĉik.

Ni kolektis 25 abonojn por „Bulgara Esperantisto“ La abon-kolektado daŭras.

Loveĉ. Dum 11—15 de Majo la societo „Espero“ organizis agitacian „verdan semajnon“. Tiuokaze estis aranĝita kaj sukcese plenumita amuzmateno. Estis deklamitaj en Esperanto: „Vivas li, vivas“ kaj „En la drinkejo“ de Ĥr. Botev. Ĉi-tiu ago atentigis la multnombran vizitantaron al la facileco de la lingvo. La salono estis, por la celo, bone ornamita.

En la tuta urbo ni disgluis kaj disĵetis propagandfoliojn kun devizoj: „Per Esperanto por la patrujo“, „Esperanto alkondukas nin al vera paco“ kaj sim. Samaj flugfolietoj estis ankaŭ donataj enmane al la urbanoj.

Malgraŭ, ke la programo estis modesta, ĝi donis bonegan pruvon, ke ankaŭ nun, kiam super la mondo furiozas milito, la esperantistoj ne dormas, sed ili vigle laboras.

Plovdiv. La Esperanto-societo „Kulturo“ varbis 30 abonantojn por **B. E.** kaj 2 abonantojn por **Suda Stelo** Sam-no Angel G. Ŝiŝkov donacis 110 levojn por nia gazeto. Entute ni ricevis de Plovdiv 770 levojn. Koran dankon!

Kazanlâk. La granda deziro de la junuloj-laboristoj, organizitaj ĉe la laborista sindikato, lerni lingvon Esperanto, estis helpita de la pli-progresintaj esperantistoj en Kazanlâk. La 10-n de junio, t. j., en la domo de la laborista sindikato oni malfermis esper. kurson, kiun regule vizitadas pli ol 30 laboristoj.

Sincere ni bondeziras al la novaj esperantistoj persiston en tiu ĉi supernobla kaj kultura laboro.

Nekrologo. Kun doloro ni informas la legantojn pri la morto de nia fervora s-ano Angel Petkov Ivanov (Anĝelo), 32 jara. Li redaktis la nacilingvan periodaĵon „Lingvo internacia“, la Esderanto-paĝon de la tagĵurnalo „Zarja“, gvidis kursojn, ktp. Niajn kondolencojn al lia familio!

Bibliografio

Kolekto „Petar Nikov“

La Bulgara Historia Societo en Sofia eldonis en memoro de la mortinta dum 1938 j. profesoro de bulgara historio, Petar Nikov, kolekton, kiu enhavas biografion de tiu ĉi scienculo verkitan de D-ro Ivan Dujĉev kaj aliajn sciencajn artikolojn je diversaj temoj pritraktitaj de prof. P. Mutafĉiev, Iv. Batakliev, V. Beŝevliev, P. Bicili. H. Batowski, N. P. Blagoev, G. J. Bratianu, Al. Burmov, Iv. Velkov, N. Vuliĉ, Hr. Gandev, E. Georgiev, Sv. Georgiev, T. Gerasimov, B. Gerov, Iv. Peŝev, Jord. S. Gospodinov, V. Grumel, C. Giannelli, Hr. M. Danov, E. Darkó, D. P. Dimitrov, M. Dimitrov, P. Dinekov, F. Dölger, Iv. Dujĉev, Pŝem. Zvolinski, arĥim. Inokentij, J. Kabrda, Kr. Kraĉunov, Iv. Lekov, V. Laŭrent, N. Mavrodinov. P. Pl. De Meester, J. J. Mikkola, K. Mirĉev, G. Mihailov, Gy. Moravcski, Vl. Moŝin, Grgr. Novak, G. Ostrogorskij, Iv. Panajotov, M. G. Popruĵenko, Hr. Rajkov, D. Rasovskij, St. Runciman, J. Swiencyckyj, Ph. Schweinfurth, K. Svoboda, Iv. Snegarov, N. Stanev, St. Stanimirov, Iv. Kr. Stojĉev, Jurd. Trifonov, Ml. Tonev, J. Todorov, T. St. Tomov, Emil Herman, A. Cvetkov, K. Ŝkorpil, Jurd. Jurdanov kaj D. Jaranov.

La prezo da la kolekto estas 350 lv. Ni recomendas al ĉiuj kiuj interesiĝas pri historiaj demandoj ĉi tiun vere riĉenhavan kaj belan volumon. *Iv. Sarafov*

LIBROJ RICEVITAJ

Respubliko de la Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilo: Statistika resumeto, ekstrak-

tita el la Brazila statistlka jarlibro, jaro IV—1938. Oziciala eldono en Esperanto de la Brazila instituto de geografio kaj statistiko. Rio de Janerio, 1940.

Aleko Konstantinov: Baj Ganju. El bulgara lingvo tradukis Cano Todorov kaj Petro Lalovski. Eldono de la Esperanto—Biblioteko „Espero", № 1. Loveĉ 1941.

Hugh Irvin Keyes: Poemoj por junuloj. Kolekto „Estu preta", № 10. Eldono de la Tutjunulara komitato de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.

Joediko: Plena gramatiko de Esperanto. 2. Cambridge St., Willonghby, Nova Suda Vales, Aŭstralio, 53-a Esperanto — jaro (1939).

Joediko: Vortoj pri la Esperanto-gramatiko, Sama adreso, 54-a E.—jaro (1940).

PERIODAĴOJ:

Hungara Heroldo, eldono de Hungara Esperanto-Federacio, XIV-a jaro, n-ro l, Marto 1941.

Arbetar Esperantisten (Laborista Esperantisto), Eldono de Svenska Arbetar — Esperanto — Förbundet, Barnhusgatan 8, Stockholm, XX-a jaro, n-roj 1, 2, 3, kaj 4 — januaro, februaro, marto kaj aprilo 1941.

Esperanto de U. E. A. jaro **XXXVII**, n-ro 487 Februaro 1941.

Svenska Esperanto — Tidningen, (La Espero). Oficiala organo de la Sveda Esperanto — Federacio kaj de la Finnaj Esperanto — societoj. Jaro XXIX, n-ro 5. Stockholm, Majo, 1941.

O Brazil Esperantista, oficiaia organo de la Brazila esperantista ligo, n-ro 37—38. Rio de Janeiro, januaro—februaro 1941.

Nia Parolilo. Loka Esperanto — gazeto, eldono de Esperantista klubo A.B.F. jaro XI, n-ro 5, Göteborg, Majo 1941.

ПОЛУЧЕНИ КНИГИ:

Жрвинъ С. Купъръ: Прераждането — надеждата на човѣчеството. Книгоиздателство „Братство" Селвиево, 1941 г. Цена 15 лв.

Ангелъ Томовъ: Що е красота. Изд. Братство, Севлиево 1941 г.

Ани Безантъ: Душата. Доказателства, че тя сжществува. Изд. Литературенъ фондъ при Българското теософско общество, София, 1938 г.

Сава Калименовъ: Ново село, социална пиеса въ 4 действия. Изд. Братство, Севлиево.

Регентский комиссаріятъ подкарпатской територіѣ: За народъ подкарпатя. Что сталося доси на подкарпатю? Esperanto Kulturservo, Hungarujo. Мартъ, 1940.

Deziraskorespondi

- S-ro Hivoto Matsuo, 1351, Kichijooja, Musashino-machi, Tokio—Shigai, Japan. Nepre kaj tuj respondas.
- S-ro d-ro F. J. Williams, port Moresbi, Papna. Korespondas pri diversaj temoj.
- S-ro Chovo Ming. First Jear dept. 3. Cteslogy University, Chungking, Ĉinio. Korespondas pri diversaj temoj kaj interŝanĝas p. m. kaj vidaĵojn.
- S-ro L. A. Steenhagen, V. Limburg. Stirunstraat 14 l. l. Amsterdam. Nederlando.
- F-ino Nora Keereveld, Amstelveenseweg 753 I supre Bui Buitenweldert, Amsterdam, Holandot
- S-ro P. J. M. Vloeimans. Zach. Jansestraa. 15. Amsterdam o. Nederlando. Deziras korespondi kun bulgaraj gesamidanoj.
- S-ro Erik Ekström, Linnégatan 38, Göteborg. Svedujo.
- S-ro Artin Uzunjan, 6, str. Jvac—Plovdiv. Bulgarujo. Korespondas pri diversaj temoj kaj tuj respondas.
- S-ro Jvan St. Gjiĝukov, v. Balvan, ok. Târnovska. Bulgarujo.

„BULGARA ESPERANTISTO" — *monata revuo oficiala organo de la Bulg. Esp. Asocio. Adreso: 20, str. Car Kalojan, Sofia, Bulgarujo. Poŝtĉekkonto:* 1133

JARABONO: *Enlande — 20 bulg. levoj. Eksterlande — 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.*

Anoncoi: 1 kv. cm. — 1 levon

RESP. REDAKTORO: P. JORDANOV

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ" —СОФИЯ — ESPERANTO-PRESEJO „HUDOĴNIK" — SOFIA-2